

bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA 1, ĈE DISTRIKTA KULTURA DOMO PRAHA
7

No.62

La 18-an de decembro 1961 Ĉeĥoslovakio emisiis okaze de la preparata universala ekspozicio de poŝtmarkoj en Praha 1962 sian unuan poŝtmarkon kun la esperanta teksto. La tuta serio konsistas el 11 diversaj valoroj de 20 heleroj ĝis 5 Kĉs. La teksto "Světová výstava poštovních známek PRAHA1962" estas skribita krom en la ĉeĥa aŭ slovaka lingvo ankaŭ en unu el la sekvaj lin gvoj: angla, araba, ĉina, Esperanto, franca, germana, hispana, itala, rusa kaj sveda.

La esperanta teksto "TUTMONDA EKSPOZICIO DE POŝTMARKOJ" troviĝas sur valoro de 2 Kĉs. Ĝi estas presita en nigra kaj oranĝa koloroj kaj reprezentas "Novan fandformegon de Klement Gottwald en Ostrava-Kunčice". Majstre desegnitajn poŝtmarkojn projektis nia eminenta grafikisto, meritita artisto pro f. Cyril. Bouda.

La poŝtmarkoj ne estas aĉeteblaj unuope /krom valoro de 30 heleroj/, sed nur en kompleta serio. Oni povas ankoraŭ aĉeti stampitan serion sur kvin diversaj unuataĝaj kovertoj /FDC/. La unua Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj okazos somere de la 18-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro 1962 en Praha. Ĝis fino de la jaro 1961 aliĝis sian partoprenon en la ekspozicio poŝtaj direktoj, filat. organizaĵoj kaj kolektantoj el 71 diversaj landoj de la tuta mondo. Arangaĵoj de tiu grandskala ekspozicio estas la Federacio de la Ĉeĥoslovakaj filatelistoj kaj la Ministerio de transporto kaj komunikoj sub alta protekto de la Internacia filatela organizaĵo FIP en Parizo.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 1, Ve Smečkách 26, je la 20-a horo

I N F O R M O

Redakto de nia Bulteno anoncas ŝanĝon de ĉefredaktoro. La redaktajn laborojn direktos nun s-ino ŘIHÁČKOVÁ Eva kun redakta rondeto. Kaj nun unu peto de nia redakto al vi, karaj legantoj de nia Bulteno:

"Dum tralego vi certe kritikis; io plaĉas al vi, io ne plaĉas. Skribu, do, al ni, eĉ sur poŝtkarto, vian kritikon, poste ankaŭ pri diversaj interesaĵoj de viaj kluboj kaj Esperanto-vivo en via loko kaj entute, kion vi dezirus legi sur la paĝoj de Bulteno. Manuskriptojn bonvolu sendi faritajn skribmaŝine kaj kun ĉeĥa traduko al la adreso: OKD-Praha 1, .z.kr., Klub esperantistů v Praze, Týnská u l. 3, Praha 1."

GRAVA ATENTIGO POR NIAJ LEGANTOJ

Nia Rondeto pagas siajn financajn elspezojn el propraj rimedoj. La plej gravan elspezon postulas la lupagoj por la kunvenigo kaj biblioteko / ĉirkaŭ 3.200 Kĉs/, multobligado de la kluba informilo kaj postelspezoj. Kun aprobo de ĜSEK ni turnas nin al niaj membroj /kiujn ni povas havi soleen Praha/. uzi la almetitan poŝtpagilon por pagi sian libervolan donacantoj uzu la poŝtpagilon, event. petu ĝian alsendon.

LANĈOV INVITAS VIN

Okaze de Somera tendaro ap. Lančov (baraĵlago de Vranov/ aranĝos ZO de Svazarm kaj Esperanta rondeto ĉe Kultura domo de B. Václavěk en Třebíč du korsojn de „Defenda ekzerco“, kies parto estos ankaŭ la instruado de Esperanto. La datoj de la kursoj:

I. 15.7.-28.7.1962

II. 29.7.-11.8.1962

Pli precizajn informojn kaj aliĝilojn /sendotajn kiel eble plej rapide/ vi ricevos je adreso: ZO SVAZARM při Osvětovém domě B. Václavka v Třebíči.

Pri la poeto D-ro Stanislav SCHULHOF kolektis unu ĉeĥa esperantisto diversajn datojn, kiujn ni nun bezonas pro kompletigo de la historio de ĉeĥa esperantista parnaso. ĉu ni trovos tiun samideanon? Li skribu al la administrejo de nia Buteno – Týnská ul. 3 Praha 1.

PROGRAMOJ EN NIA KLUBO:

/Kompletigo de la jam publikigita plano./ 17.1. "Leĝo pri kurbiĝoj de la materio" /Severa/. - 14.2. "El historio de la praga judaro" /Dr.Hataš kaj Ing Fingerland/.

MARTO: I . Literatura programo je Internacia Tago de Virinoj /Škodová, Cíhová. Mičová; junpionirinoj pridonacis ĉiun ĉeestantan virinon/. II. "Hoa Hong" /Vjetnamio; Vlasov - Mařík, laŭ "Nuntempa Bulgario"/. III . "Subteraj formoj de vulkanismo" /Kafka/. - IV. "370-a naskiĝdatreveno de J.A. Komenský" - Tago de 1' instruistoj /Cíhová - Pražák/.

APRILIO: I . Stata festo de Hungara Popola Respubliko /Josková - Mařík/.

II . Lumbildoj e l vojaĝo tra Rumanio /Dryák; aldone: lumbildoj el Nederlando/.

III . Rememoro pri la mortotago de L.L. Zamenhof. - Bartošík: "Rabindranath Thakur. hinda filozofa kaj poeto". IV. "Tempesto super Akonkaguo" /Severa, laŭ T. Sekelj/.

MAJO: I . Unuamajaj salutoj ĈSSR - USSR. - Kulturaj kaj sciencaj sukcesoj en socialismaj landoj. II . 17-a datreveno de liberigo de ĈSSR. - Literatur-muzika revuo pri dancoj kaj kantoj de Slavoj /Cíhová, Pražák/. III . Kun Ainoj en Hokaido /Mařík/.

IV. Interesaĵoj el Nordo /J.Vítek/. V. Internacia Tago de Infanoj /Škodová, Cíhová, junpioniroj kaj kolektivo/

JUNIO: I. 20-a datreveno de la ekstermo de Lidice . II . Stata festo de Korea Popola Respubliko. III . Kio nova en la Esp.-literaturo? IV. Diversaĵoj.

VIVINA KOMISIONO ĉe MEM REFERAS

Forpasis preskaŭ unu jaro, kiam de sugesto de ĈSEK, al kiu turnis sin Vilma Eichholz, gvidantino de Internacia korespondservo en Kanada virina organizacio "VOĈO de VIRINOJ", fondiĝis en Praha Virina Komisiono ĉe MEM. Sia celo estis akiri korespondan kontakton kun virino del Kanado kaj el landoj de Latin-Ameriko kad Afriko. Dum pli longa tempo ĉio restis nur plano. Post Virina Konferenco en Budapeŝto, somere 1961, kiun partoprenis virinoj el Bulgario, Hungario, Kanado, Francio kaj diversaj aliaj landoj /nian landon reprezentis samideanino Milena Škodová/ flanke de Vilma Eichholz ekestis granda intereso pri nialanda virina agado kaj si promesis sendi konvenajn adresojn por nia celo. Hodiaŭ, post la tuta jaro, nia virina agado multe antaŭenpaŝis. Ni kunvenadas ĉiun lastan merkredon en la monatoj pridiskutas aranĝon de programo por la Esp.-klubo, tralegas ricevitaĵajn leterojn ktp.

Nia lasta komuna pli granda entrepreno estis solena vespera programo okaze de la Internacia Virintago la 7-an de marto 1962. Enhavo de tiu programo estis referato de nia ĝisnuna agado, poste deklamado de poemoj kun temoj, kie la virino rolas kiel batalantino por la paco, poemoj, kiujn verkis virino, aŭ poemoj, havantaj porpacan tendencon ĝenerale. Partoprenis ankaŭ pionirinoj el mezlernejo /Praha-Smíchov, ZDŠ-Vltavská/, kiuj al ĉiuj ĉeestintaj virinoj disdonis propramane faritajn paperkorbetojn kun floroj. La infanoj ricevis Esp.-signojn kaj la ĝojo estis de ambaŭ flankoj. Al ĉeestinta jugoslava gasto ni ankaŭ transdonis la korbeton por la virinoj en Jugoslavio. Kiel reeĥo de niaj bildkartad gratulod en nomo de nia Virina Komisiono okaze de la Virintago, senditaj al reprezentantinoj de MEM en diversaj landoj venis respondoj el Leningrado de Lidio Rusanova, el Rostov-Don de gesamideanoj ĉe Domo de sciencistoj, kiuj nin invitas alveturi Sovet-Union kaj renkontiĝi en ilia urbo. El Kanado de Vilma Eichholz ni eksciis, ke tie jam multaj virinoj diligente lernas Esperanton, por povi korespondi kun niaj virinoj. En la revuo "PACO" ni jam regule apierigados nian virinan paĝon kun sciigoj pri nia porpaca agado, artikoletojn pri niaj virinaj problemoj kaj tie ni same senpacience atentos legi sugestojn, spertojn, novaĵojn el virina agado ankaŭ el aliaj landoj.

Virinoj el aliaj landoj! Aliĝu al nia porpaca movado, skribu al ni pri viaj spertoj, ĝojoj, suferoj, kunvenoj kaj ĉion direktu al nia adreso: Virina Komisiono ĉe MEM, sekretariino CÍCHOVÁ Jana, Praha 9, U svobodárny 12, Ĉeĥoslovakio.

El leteroj de mia okcidentlanda korespondanto mi citas kelkajn liniojn kiel pruvon, ke ĉie en la mondo vivas honestaj homoj kun porpaca tendenco:

"... ni ambaŭ kontribuu por la paco en la mondo per nia fidela reciproka amikeco trans la limojn, kio ja estas nia nepra devo kiel de esperantisto, kaj ni nur esperu: ke ie en la mondo ankaŭ aliaj homoj sekvos nian ekzemplon, ke finfine la prudento venku ĉion maldignan por la homaro."

Tiuj kelkaj vortoj certe parolas mem kaj diras ĉion.

Jana Cíhová

VIZITO EL FINNLANDO

La duan de majo 1962 vizitis Pragon finna samideanino Kerttu Váátauen el Lappenranta /Finnlando/. Niaj samideanoj jam ĝoje atendis sin en stacidomo kaj dediĉis sin al simpatia samideanino dum sia tuta tritaga restado en Praha. Unuan vesperon ni povis la gasto ankaŭ bonvenigi en nia klubo, la duan vesperon ŝi vizitis _koncerton de nia samideano Dro P. Sádlo-Páv. Poste ŝi ankaŭ ekkonis almenaŭ iomete la vivon de nia ĉefurbo kaj mi rekompence eksciis interesaĵojn de vivo en Finnlando. La interkompreno estis tre sincera kaj mi ĉiuj ĝis nun plezure rememoras la agrablan viziton el Finnlando.

La 3-an de majo 1962 okazis en Muzeo de B.Smetana en Praha koncerto de nia samideano, violonĉelis to D-ro Sádlo-Páv. La programo estis riĉa kaj alloga: komponaĵoj de P. Hindemith, L. van Beethoven, C. Debussy, F. Francoeur, A. Dvořák, J. Suk, B. Martinů, J. Řídký, L. Janáček kad J. Zich. La koncerton vizitis multaj samideanoj el Praha. Arta impresio estis vere granda kaj ĝi meritis ke la majstro estu invitata ankaŭ en aliajn urbojn kaj landojn.

4 TRAGEDIO EN LA UNIVERSO

La lastjaraj grandiozaj atingoj de la astronautiko turnis avidan atenton de la legema publiko kontraŭ novaj horizontoj. Al tiu arda kaj malsata intereso rapide respondas aŭtoroj de romanoj. En la inflacio de supraĵa literaturo tiuspeca tamen nur neofte troviĝas iom profunda ideo, kiu – krom sensacia fantaziado - alportus ankaŭ stimulon por la homa spirito, alten strehanta. Al la plej bonaj el la romanoj de tiu moderna temaro apartenas la verkoj de Stanislav Lehm aŭ tiuj de Ivan Jefremov - ambaŭ plenaj de granda fido pri la teknikaj kaj moralaj kapabloj de la homa socio. Alian motivon havas kaj alian celon fiksis al si verko el la manoj de grupo de junaĝaj astronomoj - esperantistoj ĉe la Observatorio en Zagreb, "Tragedio en la Universo". La mensoj de la aŭtoroj estas junaj, kleraj, sentemaj. Jes, ili konscias la grandecon de la epoko, sed ilin turmentas la kono pri la neeldirebla danĝero, kiu minacas al la homa raso el la ebla nuklea milito. Si ne povas pli bone priskribi la grandajn kaj seriozajn ideojn de la junaj aŭtoroj ol per iliaj propraj vortoj, kiam ili raportas pri la fino de la civilizo: „... Vere, la homo kreis la hidrogen-bombon kaj li regas ĝin kiel fizikan fenomenon – tamen la hidrogen-bombo, kiel socia fenomeno, nerezisteble ekregis super la homo kaj lia socio. – Neniun inspiru la trimpiluzio, ke ĉio ĉi ja, per si mem, solviĝos“. Per si mem solviĝos nenio. Ni devas tion solvi. Baldaŭe ja. Ĉar de kiam la ĉefŝtatoj posedas transkontinentajn raketojn, frapnuras la certo: La pulvomeĉo de pereado jam ekflamis sub niaj piedoj? La sola malcerto: kiom ĝi longas...“

Kaj la aŭtoroj per sugestiva strio pentras la lastajn tagojn antaŭ la katastrofo: Gazetoj ĉiutage presigis informojn pri novaj eksperimentoj per pli-pli detruaj kaj teruraj hidrogen-bomboj. La politika situacio graviĝis. Ĉiuj ŝtatoj seninterrompe havis en la aero duonon de sia aerofloto. Neniu dormis transkvile. En la konstante malfermitajn radio-aparatojn ĉiuj aŭskultis streĉkapte por ne preterevidi la alarmon, signifontan la komencon kaj la finon... Kaj fine, fulmosubite, la timfrenezo superbolis. Areto da sovaĝaj anasoj flugis iutage laŭ sia ĉiuaŭtuna vojdirekto. Deĵoranta observanto de radarstacio ne rekonis la objektojn kaj sendis alarman

informon al la komandejo. Paniko: se estas raketoj kun hidrogen-bomboj, oni ne malfruu eĉ minuton. Kaj eksonis la sortoplana komando: Pafu! Post kelkaj sekundoj jam flugis nerevokeble miloj da perigaj bomboj trans la ŝtatlimojn. Kaj tuj sekvis ankaŭ bomboj el la alia flanko. La sorto de la planedo estis decidita.

La ekbriloj de la hidrogen-eksplodoj rapidis tra la universo. Raciaj estaĵoj sur unu planedo en la astrosistemo Alfa Centaŭri konstatis la signalojn kaj elsendis ekspedicion, por ligi kontakton kun la homaro, kies vokadon ili opiniis esti kaptintaj. Ili trovis la Teron dezerta, elmortinta. Paŝon post paŝon ili deĉifradis la kaŭzojn kaj motivojn de la tragedio. Kaj registrinte siajn konstatojn, ili forlasis la senvivan planedon.

Ne, ne! Tio ne estas vero. Tio estis nur prema, inkuba sonĝo de juna studento, terura fantasmagorio de lia menso, el kiu li – feliĉe – vekigis.

Tamen, ve! Kiam li aĉetis la unuan gazeton, li povis konstati: La hidrogen-bomboj e estas sonĝo, la malvarma milio ne estas sonĝo. Sekve, la danĝero de ĝenerala pereco ne estas sonĝo, sed reala fakto, minaco, pendanta super niaj kapoj. Kion fari? Ni ĉiuj ja volas vivi! Kaj la aŭtoroj faris, kion ili opiniis necesa. Per sia libro ili pordofrapas sur korojn kaj cerbojn de ĉiuj homoj: Rekonsciiĝu! Ĉesigu la militpreparojn! Detruu la pereigajn armilojn! Ilia vokado ne estas seneĥa. Ilia libro estas amase legata kaj tradukita aŭ tradukata jam en 21 lingvojn – Ankaŭ filmo estas jam preparata. La esperantan tradukon faris Ivo Rotkviĉ. Lia lingvo estas riĉa, eĉ tro riĉa. Multo estus dirinda pri lia maniero de la vortkunmetado kaj senpera verbigado de ĉiujspecaj radikoj. Tia lingvaĵo postulas streĉon kaj sätenton de la legant, kiu multloke cerbumos, kian nacilingvan ekvivalenton trovi por tiaj esprimoj /pritalas, ankoraŭis, altujas.../.

Sed ne en tio estas graveco de la verko. Mi ne volas malplifortigi la impreson pri tiel konsiderinda libro per lingvistika traktado. La problemo, pri kiu temas, ŝarĝas nin ĉiujn. Kaj ankaŭ nia voĉo aliĝu al la vokado de la aŭtoroj, turnita al ĉiuj decidpovas homoj sur la tuta mondo: Senarmigu! Savu la homan rason de la pereco! -Pu-
Rim: La libron „Tragedio en la Universo“ eldonis la Kroata Naturscienca Societo kaj la Kroatia Esperanto-Ligo Zagreb 1961. Formato 20x14cm, paĝoj 96.

NOVA HUNGARA POŝTMARKO

La hungara ministerio de trafiko kaj poŝtoj eldonis en majo 1962 novan Esp.-poŝtmarkon okaze de Internacia Kongreso de Fervojistoj-esperantistoj en Budapeŝto, kiun partoprenis ĉirkaŭ 900 eksterlandaj delegitoj.

ESPERANTA-ĈEĤA kaj ĈEĤA-ESPERANTA POŝVORTARO

A.S. recenzas en „Zprávy“ de ĈSEK pri Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta poŝvortaro: „Verkis Rudolf Hromada. Eldonis Ŝtata Pedagogia Eldonejo Praha 1961. Paĝoj 392, 12X8cm. Eldonkvanto 3000. Prezo de bindita volumo Kčs 8,30.

Jam kelkajn jarojn sentis ĉeĥoslovakaj esperantistoj mankon de Esperantaj vortaroj. Vortara komisiono de lingva sekcio ĉe ĈSEK pritraktis ĉi tiun demandon dum sia kunveno en Brno en marto 1960. Kaj la unua rezulto de ĝia laboro estas tiu ĉi poŝvortaro de Rudolf Hromada.

La aŭtoro en sia antaŭparolo diras, ke la vortaro enhavas pli ol 5000 radikojn, ne kalkulante derivaĵojn. Sed per rapida kalkulo oni vidas, ke la parto esperanta-ĉeĥa havas 5800 radikojn kaj parto ĉeĥa-esperanta 8700 radikojn. La bazo de la vortaro estas internacie rekonita Esperanto-vortara nomo „Plena vortaro“ /1933/ kun kritike elektitaj radikoj el ĝia „Suplemento“ /1954/ rilate al moderna „Grand Dictionnaire Esperanto-Français“ de prof. G. Waringhien, direktoro de Vortara sekcio ĉe Esperanta Akademio. La vortaro enhavas eĉ multajn esprimojn de „lastaj tagoj“, ekz. sputniko /artefarita satelit/, cibernetiko, memservado, surluniĝi.

La aŭtoran senton de respondeco pri la lingva evoluo de Esperanto atestas la fakto, ke en la parto ĉeĥa-esperanta li eliminis superflujajn neologismojn, dum en parto Esperanta-ĉeĥa per envicigo de plej novaj internacie jam uzataj neologismoj li ebligas al konsultantoj de la vortaro plene kompreni eĉ la tekstojn de la plej modernaj aŭtoroj. Por lingve edukadi, la aŭtoro atentigas uzanton de la vortaro pri ĝenerale valida /oficiala esperanta esprimo, kiun oni preferu antaŭ neologismo. En granda amplekso estas prilaboritaj ĉeĥaj prepozicioj kaj prefiksoj havantaj vortokrean signifon.

La nomo de Rudolf Hromada, kiu estas konata kiel elstara, sperta Esperanta vortaristo, garantias perfektecon de lia laboro. La manuskripton kontrolis s-anoj J. Mařík kaj d-ro T. Pumpr, la lasta estas aŭtoro de alligita resumo de Esperanta gramatiko. Per valoraj rimajkigoj kaj teknika helpo atribuis al la verko Jiří Hromada.

La libro estas bindita en praktika kovrilo el armaterialo /PVC/- Esperantistoj kritikis malĝustajn kolorojn de E-emblemo sur kovrilo: verda fono, blanka stelo kun verda -E-. Sed tio estas kulpo de grafikisto.

Nova Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta vortaro estas valora helpilo por ŝeĥoslovakaj esperantistoj kaj ĝi estas fundamenta ŝtono por ellaboro de „granda“ vortaro.

La eldonkvanto estis forvendita dum kelkaj tagoj kaj pli ol 2000 mendintoj atendas ĝian novan eldonon aŭ almenaŭ eldonpreson.

NI ATENTIGAS,

Orbis en Praha eldonis en la jaro 1961 la duan reverkitan eldonon de broŝureto „JUĜU MEM! FAKTOJ PRI ĈEĤOSLOVAKIO“ en la traduko de Miloš Lukáš. Ĝi estas riĉigita per multaj fotografajoj, enhavas geografian karton de la respubliko. La broŝureto havas 110 paĝojn, formato 16,3X12,3cm kaj la prezo estas Kčs 5,70. Tiun ĉi broŝuron vi povas donace sendi al viaj eksterlandaj amikoj kaj ĝi estas aĉetebla en „KNIHA“ – vendejo S105, Václavské nám. 42, Praha 1.

NIGRA ELEFANTO KAJ ĜIA ĈIRKAŬAĴO – J. Šustr

La domo, nomata "Nigra elefanto", staras jam longajn jarcentojn. Dum tiu tempo venis en ĝian proksimecon nemalmultaj historiaj personoj. En la postsignoj de kelkaj ni iris en la antaŭaj kvar ĉapitetoj de mia rakontado. Lastfoje ni atentis vizitanton, kiu estis ĉi tie antaŭ plena jarmilo. Nun ni saltu trans ses jarcentojn kaj ekskursu en la komencon de la deksepa jarcento. Ni ree eliru el la biblioteko de la Esperantista klubo ĉe "Nigra elefanto". Ni vizitu tombon de eminentulo, kiu dum sia ne longa restado en Praha la Nigran elefanton verŝajne neniam preteriris. Lin oni alportis ĉi tien nur post lia morto, por entombigi lin en la preĝejo de Virgulino Maria en Týn. Estis dana astronomo Tycho Brahe /Tino Brahe/.

Ok aŭ dek paŝojn ni bezonas por esti jam ĉe la muro de tiu granda preĝejo. Post pliaj eble 20 paŝoj ni staras antaŭ la flanka enirejo, por ke en sekva momento ni troviĝu sub ogiva volbaĵo de la sanktejo. La tombon de Tycho Brahe ni trovos tre facile. Ĝi situas en loko tre honora, en ĉefa navo, proksime al la ĉefaltaro. Dana flageto, kiun postlasis ĉi tie iu el okazaj danaj vizitintoj, plifaciligos al ni la serĉadon. Novtempa nigra tomboŝtono kovras la kripton.

Malnova ĝia antaŭulo el ruĝa marmoro staras kiel monumento apude. Ĉi tie do ripozas granda sciencisto de „sia epoko Tycho Brahe. Favorato de cena régo kaj imperiestro Rudolfo II-a, fama astronomo, eminenta matematikisto, scienca verkisto, inventisto kaj fondinto de praktika astronomio, persona amiko de Kepler, homo, kiu dum sia vivo spertis malfeliĉojn, persekutojn kaj malfavorojn sennombrajn. Elpelite el sia patrujo li sekvis inviton de granda amiko de sciencoj kaj artoj - la ĉeĥa rego Rudolfo II -a, kaj vivis ĉe lia kortego en Praha. Siajn astronomiajn observojn li faris grandparte en la kasteleto de Benátky nad Jizerou, kie ankoraŭ hodiaŭ simile kiel en Praha, troviĝas kelkaj en liaj astronomiaj instrumentoj, kiujn laŭ liaj inventaj desegnoj kaj konsiloj konstruis por li ĉeĥaj metiistoj. Post sia tragedia morto en jaro 1601, la la deziro de reĝo li estis ĉi tie entombigita la 25-an de oktobro 1601. Amasago da

popolo, eminentaj sciencistoj kaj artistoj, tuta reĝa kortego kaj la reĝo mem ĉeestis. Elstaraj personecoj el rondoj sciencaj parolis super la ĉerko. Pasis 300 jaroj. Estis jaro 1901. En Praha okazis granda kongreso de astronomoj kaj matematikistoj. La kongresanoj venis por honorigi la memoron de Tycho Brahe. Ne longe antaŭ tio, fama antropologo profesoro Matriegka esploris la kripton. Kvankam pasis tri jarcentoj de la morto, la restaĵoj de Tycho Brahe estis facile rekoneblaj laŭ difekto de la kranio, kiun Tycho dum malfeliĉa duelo foje suferis. Kun li ripozas en la kripton ankaŭ lia edzino Kristina. Pasis ankoraŭ 50 jaroj. En la jaro 1951 okaze de 350-a datreveno de la morto de ĉi tiu astronomo rememoris pri li liaj samlandanoj-esperantistoj. Estas jam malnova nia kutimo ĉiun danan aŭ skandinavan esperantiston venigi al ĉi tiu tombo. Centra Dana Ligo Esperantista sekvante la deziron de siaj membroj kiuj foje vizitis ĉi tiun lokon sendis rubandon por ornbami la tombon. Honora tasko de Prahaj esperantistoj estis aldoni la florkronon. Ĉio okazis tre bone. Ne nur esperantistoj venis, sed ankaŭ multaj neesperantistoj. Super la tombo okazis paroloj en lingvoj ĉeĥa kaj Esperanto, granda florkrono kun verdaj rubandoj de CDEL estis metita sur la tombon. Solena ilumino de preĝeja interno donis al la ceremonio neatenditan brilon. tutan tagon kaj tutan nokton du grandaj kandeloj brulis ĉe la kapo de tombo. La rubando kun kelkaj aliaj, kiujn alportis danaj esperantistoj, ankoraŭ hodiaŭ parolas pri Esperanto al ĉeĥaj kaj eksterlandaj turistoj, kiuj ĉiutage venas ĉi tien. El la familio Brahe neniu plu vivas. Antaŭ kelkaj jardekoj elmortis tiu gento. Sed en Praha oni rakontas, ke ĉi tie vivas lasta parenco de Tycho Brahe. Estas la librobindisto kaj preĝeja pedelo s-ro Davídek, kiu dum longaj jardekoj zorgas pri bona staro de multaj trezoroj de la preĝejo kaj pri bona stato de la tombo de Tycho Brahe unualoke.

NIA JUBILANTINO

La 28-an de aprilo 1962 s-anino Anna BÁROCHOVÁ enpasis sferon de esperantistoj – veteranoj, ĉar forpasis jam 40 jaroj ekde ŝia esperantistiĝo.

Okaze de ŝia naskiĝtago la 23-an de majo Esperantista klubo en Praha en kunvena programo solene memorigis tiun, por ŝi gravan eventon per transdono de gratulletero, donacetoj kaj amasego da florbukedoj. Nia esperantistaro alte taksas ŝian longjaran, meritplenan laboron por nia klubo kaj Ensperanto-movado entute.

Multe da sano kaj feliĉo por plua poresperanta laboro, kara samideanino Anĉi Bárochová!

HELPU TROVI FRATON al tri fratinoj, kiuj serĉas sian fraton Ivan Jakovleviĉ Sypĉenko, nask. 1897, kiu estis okupita en jaro 1925 en lakot-uzino apud Praha. Bonvole skribu al: A.SIDOROV, ul. B. Chmelnickogo 10, Ĉerkassi obl. USSR

BELULINO MILJARA

La turista trafiko ĉiujare venigas dekmilojn de fremdlandanoj kaj pluaj centmiloj venas el ĉiuj anguloj de Ĉeĥoslovaka respubliko por ĝuadi la historiplenan belecon arkitekturan de la urbo, kiu viciĝas inter la plej belaj en la mondo.

Ĉiutage apud ĉi tiuj arkitekturaĵoj klaketas fotoaparatoj de vizitantoj malavaraj en admiro pri la belarto, kies lulilo ĉi-urbo fariĝas kaj alte ŝatantaj la ŝtatan zorgon pri konservo-restaŭrado de historiaj memorindaĵoj elokvente atestantaj altnivelan kulturecon de la loĝantaro.

Ĉi tiu pozitiva rilato al kulturhistoriaj memoraĵoj esprimiĝas ankaŭ en principoj direktantaj la konservadon-restaŭradon de unuopaj arkitekturaĵoj samkiel de tutaj urboj:

KONSERVI historian medion per urbanisme sentema ĝia eluzo por vivbezonoj de samtempa loĝantaro.

KREI harmonian akordon de la urbo historia kun la moderna konstrucelo kaj samtempe rebonigi domaĝojn kaj difektaĵojn estiĝintajn dum lastaj cent jaroj.

KONSIDAERI la rekontru-procedon de historiaj urboj kiel specialan parton de la ŝtatbudĝeto.

Ĉio ĉi postulas ne sole grandan elspezon, sed ankaŭ senteman kapablon, ĉar ĉi tie oni konservas kaj rekonstruas la medion de historiplenaj stratoj kaj de unuopaj monumentaĵoj, malkovras ilian arkitekturan belarton, kiu perdis sian originan vizaĝon sub ili postas banalgustaj fasadoj per butikportaloj, surkonstruaĵoj kaj nekonvene adaptitaj tegmentoj. Krom tiu rekonstruata procedo renoviĝas grandmezure ankaŭ pli miniaturaj belart-memoraĵoj kiel ekzemple akvujoj, plastikoj, lumiloj, kradaĵoj.

Ĉe la renoviga laboro ne agiĝas nur pri ekstera afekto, sed precipe pri nova funkciado de tiuj historion konservantaj objektaĵoj. Multaj jam delonge perdis sian originan funkcion, sed nun ili ricevas novan enhavon, novan kultur-historian mision utilan al samtempa socio.

Tion oni necesas konscii preterirante ankaŭ la objektaĵojn ankoraŭ ombrumitajn de trabaĵo, sed rebrilontaj per nova beleco.

Luboš Svátek: El la gazeto "Nová Praha!"

Esperantigis: Jana Cíhová.

En Praha mortis 13. 1. 1962 Hynek Karel Bouška, meritplena veterano de la movado. Li estis emerita oficisto de urbo Praha, naskiĝinta 4.3.1884, homo tre modesta kaj esperantisto tre laborema. Kunfondinto de Esperantista Klubo en Praha /1962/, iniciatinto kaj komitatano de Bohema Asocio Esperantista /1908/, aŭtoro de eminenta verko Ŝkola esperanta /Lernejo de Esperanto, 1921/, de Lingvaj klarigoj /"Progreso"/, porinfana gazetkurso kaj de ĉeĥa informa flugfolio "Esperanto - unueca lingva ligilo de la nacioj" /ses eldonoj, 30.000 ekzemp./ . Lia politik-informa verko "Slovakoj kaj Magiaroj" antaŭ la unua mondmilito vekis grandan interesiĝon de la eŭropa publiko. En prespretaj manuskriptoj postrestis ampleksa laboraĵo pri J.A. Komenský kaj Malgranda lernolibro de Esperanto /ĉeĥa/, verkita laŭ lia speciala metodo. Li redaktis la revuojn Bohema Esperantisto /1908-11/, Ĉeĥoslovaka Gazeto, Nova Eŭropo /1921/ktp.

S-ano H.K.Bouška fosis longan sulkon en la ĉefia Esperanto-movado kaj akiris honoran lokon en ĝia historio.

15.3.1962 la instruistaro en Praha adiaŭis al František Pátek, estinta distrikta lerneja inspektoro kaj laboranto en la ministerio de instruado. P. Pátek, naskita 21.11. 1882 en Velká Losenice, estis multflanka pedagogia verkisto kaj propagandanto de Esperanto en lernejoj. Li preparis siatempe projekton de nova lernolibro de Esperanto por lerneja junularo kaj iniciatis en jaro 1924 permeson de landa lerneja instanco konigi al lernejoj en la distrikto Český Brod la signifon de Esperanto.

OTTO SKLENČKA, unu el elstaraj esperantisto j en ĈSSR, mortis en Praha la 4-an de majo 1962. Li naskiĝis la 2-an de novembro 1891, esperantisto de la jaro 1908. Komitatano de la landa Esp.-Asocio de post ĝia fondo, de la jaroj 1930-34 ĝia kasisto. En sia funkcio de UEA-ĉefdelegito /1923-34/ kun teritoria oficejo en Hradec Králové li montris grandan persistemon. Sinceran kondolencon al la edzino kaj filo!

DEZIRAS KORESPONDI

Brazilo:

= HOFF OSCAR, Rua Ferreirg Penteado 276,Campinas, dez.kor.pri ĉiuj temoj.

BULGARIO :

= Pri botaniko, florkulturado dez.kor. kaj inlterŝ.PI kaj semojn de interesaj vegetaĵoj lernantoj en Pionirdomo de Kubrat .Skribu al ilia instruisto S-ro IVAN M.GRIGORENko,ul.Vapcarov 11, Kubrat, ok. Razgradski.

= DOBRI GOROV, Barakovo, Kjustendil,ddeziras korespondi pri lingvistiko.

= SAVA RAIKOV, Ruski n-ro 94,3tara Za- gora, dez. kor. /komencanto/.

= GRIGOR N. BOJAĜIEV, Rakitovo-Pazargi-ski-instruisto - dez. kor.

= HRI3T0 CENOV BÍKOV3KI, Orjafiovaska 11,Vratca, instruisto, dez.kor.

= IGNAT LSFTEROV IGNATOV, Ribarica 67a Huse, 18-jara, dez.interŝ. bildkartojn.

= DONKA PEJKOVA PETROVA, ul. Baba I-'a- raskava n-ro 6, Vh."B" Ap."3", Dimitrovgrad, laboristino, dez.kor.

JAPANIO:

= MASAHIRO ITO, P.O.Box 8, Suginami Tokio,dez.inters.uzitajn PM kaj insektajn ekzemplerojn.

= REIKO NAGAOKA, Ko-3624—4, 3agae-si, Iamagata-ken,instrui st ino,dez.kor.

POLLANDO :

= KRYSZYNA KOCIŃSKA, Sobieskiego 27, Gnieznowo,dez.inters.vidaĵkartojn kaj alumetetikadojn.

= AWIZYŃ WALDEMAR, 14.M.Rataja 78 m 2, Olsztyn, dez. inters. PM.

= TERESA ZAK, ul.Slaska 20m.II,3zcie- cin,32-jara f-ino,dez.kor.kun ĉehosi, gesamideanoj pri turismo, literaturo, filmo, sociaj aferoj ktp.

= CZESLAW NIEDÉWIEDŹ, Peskowów 20, p-ta Pieszycyca pow.Driewzoniów, dez.kor.kun geknaboj.

= DANUTA FILIPEZAK, ul.Garneckiego 35- 7, Ostróda, dez.interŝ. BK kun gelernantoj 13-15-jaraj.

VENEZUELO :

= BELTRAM CEVA VELASQUEZ, Apartado de Correos 2222, Caracas, dez.kor.kun CSSR / precipe pri filozofio, literaturo kaj ekonomio/.

BULTENO informilo de Esperantista Klubo en Praha ĉe distrikta kultura domo Praha 1.

Eldonas OKD-Praha 1.Ĉefredaktorino: Eva Řiháčková,

U kněžské louky n—ro 32, Praha 3, telefono 83664 Administrejo:Týnská ulice 31 Praha 1, Staré Město.